Mupo kaj Nabiko



Mupo kaj Nabiko

Rakonto por infanoj

Erik Tantal

Enhavo

La truo.....4
Helpo.....12
En la klasĉambro.....16
En la domo.....20
Ĉerizŝtonoj.....23
Reflugo.....28
La figuroj.....31
Postparolo.....33
Kolofono.....35

La truo

Mupo eksaltas el la lito.

„Dio, tio vere estis hela fulmo“, li pensas kaj atendas la tondron.

Sed li aŭdas nur mallongan krakon kaj strangan zumadon kiuj venas el la ĝardeno. Rapide li kuras eksteren. Tie, meze de la herbejo, densa nigra fumo venas el la tero.

„Kio okazis? Kial tiom da fumo?“, li demandas sin. Singardeme Mupo iras antaŭen kaj malkovras grandan truon en la tero. Eĉ ĝuste ĉe la rando de tiu truo la fumo malhelpas la vidon. Kaj daŭre tiu zumado.



Mupo ne volas fali en la truon. Tial li ekkaptas longan stangon kaj puŝas ĝin singardeme malsupren. Subite li aŭdas: „Atentu! Ne ataku min! Mi estas vundita!“

„Kiu estas en la truo?“, flustras Mupo kaj timigite saltas malantaŭen.

Post unu minuto li pli kuraĝe alproksimiĝas al la truo kaj vokas: „Kiu vi estas? Kial vi estas ĉi tie?“

Tiam iu respondas per malforta voĉo: „Helpu min! Mi ne povas liberigi min. La elirejo estas blokita.“



Nun la nigra fumo iomete malaperas. Mupo povas vidi, ke estas granda arĝenta globo en la truo. Sur la supro de la globo estas la elirejo. Sed tiu malfermiĝis nur per mallarĝa fendo.

Tie mano eliras svingante tien kaj reen. Sed Mupo ne povas helpi. Mupo ne estas sufiĉe forta por malfermi la pordon. Li ankaŭ ne povas eltiri la tutan globon el la truo.

Kun laŭta voĉo li krias: „Unu momenton! Mi demandas la malgrandan elefanton Amal. Li certe helpos!“

Post tiuj vortoj Mupo rapide kuris al la najbara domo, kie loĝas la malgranda elefanto.

„Kial vi tiom rapide kuras?“ demandas Amal.



Ekscitite Mupo rakontas al li pri la arĝenta globo kaj la truo en la ĝardeno.

„Kompreneble mi helpos“, diras Amal. Rapide li kuras kun Mupo al la truo en la ĝardeno. Per dika ŝnuro li provas eltiri la arĝentan globon el la truo. Grandegaj gutoj de ŝvito fluas laŭ lia trunko. Sed li ne sukcesas.

„La globo estas tro peza! Mi bedaŭras. Mi ne estas sufiĉe forta“, plendas la malgranda elefanto kaj pro elĉerpiĝo falas teren.

Sed Mupo havas bonan ideon. Li tuj kuras al la granda paŝtejo kaj petas la dikan bovon Taŭrolo por helpo.

Nun la malgranda elefanto havas fortan subtenon. Kune kun la dika bovo ili ambaŭ tiras kaj tiras la ŝnuron. Finfine la arĝenta globo rulas sur la herbejo.



„Hura, ni sukcesis!“, triumfas la amikoj.

„Dankon, Dankon! Helpu min eliri. Mia tria gambo doloras“, petas la fremdulo.

Jes, li vere havas tri gambojn. Tion li klarigas: „Mi venas de la fora planedo Nokaptota per mia eta spacopramo, la arĝenta globo. Ĝi tre bone funkciis, sed en la proksimeco de la tero difektiĝis la motoro. Nur daŭra zumado avertis pri la danĝero. Tiam la globo senpove falis teren kaj kaŭzis la truon en via ĝardeno.“

„Ne gravas, trankviliĝu! Vi estas bonvena. Estu nia gasto“, diras Mupo kaj la du amikoj konsentante kapjesas.

La malgranda elefanto aldonas: „Mi estas Amal. Diru al ni vian nomon!“

„Mi nomiĝas Nabiko. Dankon pro via afabla akcepto. Ĉu vi povas doni al mi iom da akvo kaj iom por manĝi? Mi vere soifas kaj malsatas.“

„Kompreneble!“, respondis Mupo. Li tuj kuras en la kuirejon kaj revenas kun akvo-botelo kaj granda korbo, plenigita de pano, fruktoj kaj eĉ frandaĵoj.

„Ho, ho! Tio aspektas bone! Mi ankaŭ soifas kaj malsatas“, vokas la malgranda elefanto.

Mupo nun ankaŭ invitas la dikan bovon partopreni la bufedon. Sed Taŭrolo rifuzas:

„Dankon! Mi tuj reiras al la verda paŝtejo. Tie troviĝas sufiĉe da freŝaj folioj, herboj kaj eĉ flavaj floroj de la leontodo.“

Nabiko, Mupo kaj Amal restas apud la arĝenta globo kaj ĝuas la manĝaĵon. Ili gaje kantas:

Ni manĝas, ni manĝas.
Bufedo en maten'.
Ni trinkas, ni trinkas.
Kantino en ĝarden'.
Rostita pan' kun vinbersuk'
bongustas sen kompar',
Batita krem', karotokuk',
festeno kun nektar'. [*1]

Helpo

„Iri kun mi. Mi montros al vi mian domon“, proponas Mupo.

„Ne, ne. Mi ne povas iri. Mia tria gambo tro multe doloras“, plendas Nabiko.

Nun ankaŭ Mupo vidas, ke la tria gambo de Nabiko ne estas en ordo. Ĝi estas pli dika ol la aliaj gamboj.

„Restu ĉi tie. Mi demandas la kuracistinon. Ŝi certe povas helpi“, diras Mupo kaj ekmarŝas.

Sed estas longa vojo. D-rino Miaŭo loĝas ĉe la alia flanko de la lageto. Mupo rapidegas. Li baldaŭ multe ŝvitas.

„Kra, kra. Kien vi tiel rapide kuras?“



Borge, la nigra korvo, alteriĝas ĝuste antaŭ Mupo, kiu nun raportas ĉion al li.

„Reiru al la fremdulo. Ne lasu lin sola. Mi tuj flugos al la kuracistino. Mi estas pli rapida ol vi. Nur atendu iomete!“

Post tiuj vortoj la nigra birdo leviĝas en la aeron kaj malaperas en la ĉielon. Kaj Mupo reiras al Nabiko.

Ne daŭras longe kaj d-rino Miaŭo alvenas.



Ŝi zorgeme inspektas la dikan gambon de Nabiko. Ŝi kantas:

Ne estu plor', ne plu dolor',

doloro for de vi!

Tial mi volas ridi nur.

Ĉu vere ankaŭ vi?

Se fido estas en la kor'

ne gravas la horor'

Ne estos ploro,

nur humor', nur ĝojo la dekor'

Venu, fidu, ankaŭ vi.

Venu, fidu nur kun mi! [*2]

„Ne timu. Tio baldaŭ malaperos. Estas ja nur ŝvelaĵo pro la hematomo. Verŝajne okazis forta puŝo dum la kraŝo de la kosmopramo.“

„Jes, vi pravas. Dum la surteriĝo mi estis forte puŝita kontraŭ la vando. Sed kion mi devas nun fari?“

„Restu trankvila kaj evitu ŝarĝon de la doloranta gambo. Mi donas al vi sanigan ungventon. Kaj uzu lambastonojn dum la venonta semajno.“

„Koran dankon, d-rino Miaŭo. Mi sekvos vian konsilon. Koran dankon!“

Kaj Mupo ankaŭ dankas la nigran korvon, kiu tiom rapide informis la kuracistinon.

En la klasĉambro

„Nabiko, venu kun mi al la lernejo. Mi volas prezenti vin al Bamo kaj Aliki kaj al miaj aliaj klaskamaradoj. Ili ankaŭ devas konatiĝi kun vi. Prenu la lambastonojn. Estas nur mallonga vojo.“

Mupo kondukas sian gaston al la lernejo. Jam antaŭ la klasĉambro kolektiĝas ĉiuj gelernantoj. Ĉiu volas saluti la fremdulon. Sed Mupo bremsas ilin. Li puŝas Nabikon en la klasĉambron.



La instruisto S-ro Moreti permesas, ke li prenas lokon apud Mupo.

„Ĉu vi vere estas eksterterulo?“
„De kie vi venas?“
„Kial vi parolas nian lingvon?“
„Kiom longe vi restos ĉi tie?“
„Kial vi havas tri gambojn?“

Aperis ankoraŭ multaj aliaj demandoj. Nabiko komencas respondi.

Li rakontas pri sia hejma planedo. Tie ĉiu havas tri gambojn.

„Mi ne komprenas kiel la homoj povas iradi kun nur du. Sed mi bone komprenas vian lingvon, ĉar mia vojaĝo daŭris tre longe. Mia kosmopramo flugas tre rapide. Malgraŭ tio mi bezonis dek du

monatojn por la tuta vojo. En tiu tempo mi havis sufiĉe da tempo por lerni vian lingvon.“

La demando, kiam longe li planas resti ĉi tie, li ne povas bone respondi. La kosmoŝipo ja verŝajne difektiĝis dum la kraŝo. Nabiko prezentas etan kanton:

Pli rapida ol dinam',
servis kosmopram'
Flugis gaje tra ĉiel'
estis spac'-gazel'
Estis spac'-gazel'
en la vasta ĉiel'
Kraŝis sur la ter'
kuŝas en krater' [*3]

„Ĉu vi konas iun, kiu povas inspekti kaj eventuale ripari mian kosmopramon?“, li demandas.

La gelernantoj vigle diskutas diversajn eblojn. Unu fanfaronas: „Mia onklo estas tre lerta inĝeniero. Li certe povas fari tion.“

Alia ankaŭ proklamas: „Mia avo jam riparis multajn traktorojn. Li estas pli bona teknikisto, mi pensas.“

Finfine s-ro Moreti petas la tutan klason por trovi eblan helpanton: „Tio estas via hodiaŭa hejmtasko!“, li emfazas kaj adiaŭas la gelernantojn.

En la domo

„Venu ĉi tien, Nabiko. Mi prezentas al vi nun mian ĉambron.“

Mupo fiere montras al siaj plej ŝatataj ludiloj. Al tiuj apartenas la ĉarma pluŝurseto, la ligna ludiltrajno kaj kompreneble la piedpilko.

Nabiko scivoleme inspektas la buntajn infanlibrojn. Li neniam vidis ion similan, ĉar ne ekzistas libroj sur la planedo Nokaptota. Tie ĉiu legas nur per sia Hovadmo, tiu aparato similas kompufonon.

Subite Nabiko ekvidas grandan skatolon en la angulo.

„Kio estas en tiu skatolo?“, li demandas.

Mupo ridetas: „Estas mia trezoro. Malfermu ĝin!“

Nabiko nun trovas centojn da buntaj plastaj briketoj. Mupo ĝoje komencas konstrui. La briketoj kuniĝas per klako kaj post kelkaj minutoj Mupo povas prezenti etan buntan lokomotivon. Nabiko nun ankaŭ komencas kunmeti la briketojn. Li konstruas longan kosmoŝipon.

Ambaŭ forgesas la tempon. Intertempe ĉie en la ĉambro troviĝas etaj konstruaĵoj el la briketoj. La skatolo estas malplena. Mupo kaj Nabiko estas nun dormemaj.

„Vi povas ripozi en mia lito“, proponas Mupo.

„Kaj kie kuŝas vi?“

„Ne estas problemo. Mi uzas aermatracon kaj dormas apud la lito.“

Li malŝaltas la lumon kaj baldaŭ aŭdiĝas la paca ronkado de la du novaj amikoj kune kun la kantado de la najtingalo Viviane.



Ĉerizŝtonoj

Bedaŭrinde neniu trovis iun, kiu povas ripari la kosmopramon de Nabiko. Restas nur unu eta ŝanco.

„Ni demandu la saĝan gufon Sekou. Li certe trovos iun“, diras Mupo, sed li ne scias kiel li povas trovi lin.

Denove venas helpo de Borge. La nigra korvo laŭte krakas:

„Kra, kra. Mi jam estas survoje. Mi scias kie li estas“.

Nur post kelkaj minutoj alflugas Sekou. La granda mistera birdo sidiĝas sur la barilo. Pacience li aŭskultas kion Mupo kaj Nabiko rakontas.

„Bone, ke vi demandas min. Mi ja konas multajn. Mi pensas ke la lerta vulpo Ĉung estas la ĝusta por vi. Atendu nur, mi sendos lin al vi hodiaŭ.“



Ĉung vere estas tre bona inĝeniero. Li inspektas la kosmopramon kaj tuj trovas la problemon.

„Ho, ho! La maŝino tute ne estas difekta. Mankas la fuzaĵo. Mi trovis nur tiun etan kernon aŭ ŝtonon. Kia materialo ĝi estas?“

Nabiko honteme konfesas, ke li ne scias tion. Sed Mupo solvas la problemon. Li ĝoje vokas:

„Ĝi aspektas kiel ĉerizŝtono! Kara korvo, informu ĉiujn samklasanojn. Ni ĉiuj iru al la ĉerizarbo! Kantu kune!“



Ĉiu knabo kaj knabino

ĝoju pri la vitamino,

kiu estas en ĉerizo,

estas bona medicino.

Tial pluku, tial manĝu.

Tiuj fruktoj vere tentas nin.

Ĉiu pluku, ĉiu manĝu.

La ofert' ĝojigas nin.

Viaj lipoj kun beleco

La koloro nun karmin'. [*4]

Estas granda festo. Mupo, Nabiko kaj la tuta klaso kolektiĝas apud la ĉerizarbo kaj komencas manĝi la dikajn ruĝajn fruktojn. Poste ili kraĉas la kernojn en la bluan sitelon. Kiam la sitelo estas plena, Mupo vokas:

„Nun ni havas sufiĉe da fuzaĵo kaj la kosmopramo povas longe flugi. Krome ni ĉiuj estas nun sataj kaj ni ricevis multajn vitaminojn!“



Kaj Nabiko dankas ĉiujn. Li estas tre feliĉa. Ankaŭ la ŝvelaĵo de lia tria gambo malaperis.

Reflugo

„Kara Nabiko, ĉu vi povas kunporti min en via kosmopramo?“, demandas Mupo.

„Jes, sed nur por mallonga tempo. Vi devas frue forlasi la pramon per paraŝuto. Tiam vi havas belan vidon de supre. Vi certe estas sufiĉe kuraĝa por tio“, respondas Nabiko.

Mupo vere ĝojas: „Jes, kompreneble. Hura! Mi flugos kiel birdo! Tion mi devas rakonti al la nigra korvo kaj al Sekou, la gufo.“

La nigra korvo Borge kaj la gufo Sekou sidiĝas sur la ĉerizarbo kaj rigardas la lanĉon de la kosmopramo.

Kun laŭta bruo leviĝas la spacveturilo en la aeron. Iom post iom gi malgrandiĝas por la okulo.

Sur la ĉielo videblas nur eta punkto. Kaj tiam aperas nova punkto.

Estas la paraŝuto kun Mupo. La korvo kaj la gufo leviĝas en la aeron kaj flugas supren. Kune kun la paraŝuto ili surteriĝas sur la herbejon.



Mupo feliĉe revenis. Li laŭte vokas: „Ĝis revido, Nabiko. Bonan vojaĝon!“

Sed Nabiko ne plu aŭdas tion. Li devas nun longe vojaĝi. Mallaŭte li kantas en la kosmopramo:

Ĝis revido tero,

mi nun devas iri for.

Flugas tra aero

kosmopramo sen ŝofor'.

Pli rapida ol la vent'

supre en la firmament'. [*5]

La figuroj

1

2

3 

4 

5 

6

7

8

9

10

11

12

1 • Mupo, 2 • Nabiko, 3 • Amal, 4 • Taŭrolo, 5 • Borge

6 • d-rino Miaŭo, 7 • Aliki, 8 • Bamo, 9 • s-ro Moreti

10 • Viviane, 11 • Sekou, 12 • Ĉung

Postparolo

La kvin strofoj, prezentitaj en tiu rakonto, apartenas al la kantoj, kiujn vi trovas sur miaj retaj paĝoj ĉe:

http://esperanto-klaus.de

Tie vi povas aŭskulti la melodion, legi kromajn strofojn kaj ankaŭ la notojn.

Kantu laŭ tiuj melodioj:

*1: „Niaj bestoj“
*2: „Mi lernas“
*3: „Lulkanto“
*4: „Festo-kanto“
*5: „Vigla melodio“

Grandan dankon al Jan Friese, kiu zorgis por la plibonigo de la melodioj kaj la muzika aranĝado. http://esperanto-klaus.de

Kaj multan dankon al ĉiuj, kiuj helpis malaperigi la erarojn.

La rakonto „Mupo kaj Nabiko“ estas havebla sur mia hejmpaĝo. Tie vi trovas ankaŭ la germanan version „Mupo und Nabiko“.

Erik Tantal alinome Klaus Friese

Kolofono

Titolo	Mupo kaj Nabiko
Aŭtoro	Erik Tantal alinome Klaus Friese
Versio	1-a eldono, 2022

Aŭtoraj rajtoj	© Klaus Friese, Hamburg

Retpoŝto	friese@esperanto-hamburg.de

Desegnaĵoj	Erik Tantal
Hejmpaĝo	esperanto-klaus.de